# *Kubo ratifis en ?enevo sian enga?i?on pri homaj rajtoj.*




?enevo, 16 maj (RHK) La kuba ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, ratifis la sindevontigon de Kubo kaj la garantiojn por plenumo de la homaj rajtoj.

Dum la perioda ekzameno universala pri homaj rajtoj okazanta en tiu ?i urbo svisa, la kuba ministro pri eksteraj rilatoj emfazis ke la prezentita dokumento estas rezulto el vasta procezo partopreniga de konsulti?oj, kiuj implikis plurajn instituciojn registarajn kaj de la civila socio.

Rodríguez klarigis ke la prezentita raporto anka? estas rezulto el la starigo de la rekomendoj akceptitaj dum la dua tiaspeca ekzameno okazinta en 2013, plenumitaj preska? komplete.

Same, li elstarigis ke la kariba lando da?re plifortigas sian kunlaboron kun la mekanismoj de UN kiuj prizorgas tiun ?i agadkampon, kaj argumentis ke Kubo plenumadis rigore siajn devontigojn kaj devigojn internaciajn.

Tiurilate, li anka? detaligis ke Kubo estas membro-parto de 44 el la 61 internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, kio lokas la landon en la grupo de ?tatoj kun pli alta nombro da ratifitaj mekanismoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/162385-kubo-ratifis-en-genevo-sian-engagigon-pri-homaj-rajtoj

# Radio Habana Cuba